

Johannes R. Becher,

## Kristnasko

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ekfloras nun en blanka vest'  
la vintro en branĉaro.  
Solece frostas birdo-nest',  
la sonorilojn la krist-fest'  
sonigas tra l' flokaro.

La spac' sin klinas super ni,  
kaj ankaŭ ni kliniĝas.  
Jen nova stel' ĉe la abi'.  
Infan-songeĉe brilas ĝi,  
elbranĉe ĝi vidiĝas.

*Traduko de la Germana poemo "Weihnacht" de JOHANNES R. BECHER (\*1891-05-22 – †1958-10-11) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2002-12-02.*

*MR-393-2 / Arg-794-1590 (2013-01-22 22:14:02)*